

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Decembro 2020

(52a jaro)

N-ro 185


Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen

Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP

B
o
n
a
n



N
o
v
a
n
J
a
r
o
n

Karaj Geliganoj!

Alvenis la lasta tago de la 2020^a jaro. Jaro tre malfacila por ĉiuj, kiun forgesi ne eblos. Nenio aldonendas, ĉar ĉiu el ni, pli-malpli, travivis la samajn spertojn kaj bedaŭrinde rekte konatiĝis kun tio kion la pandemio estigis. Kio plej gravas estas nun superi ĉion kaj ekvidi la lumon je la fino de la nigra tunelo traborita de la kronviruso.

Ĉi tiu drama jaro signifis ankaŭ la halton de renkontiĝoj, kongresoj kaj eĉ simplaj amikaj intervidiĝoj, vizaĝ-al-vizaĝe! Partopreneblo en iu ajn kunveno estis nuligita kaj anstataŭigita per virtualaj enretaj eventoj. ELF-AREK ĉeestis la UK-n dum du sabatoj, je ties ĉi komenco kaj fino; pli poste, novembre, la Memorialon de 'Lucija Borĉić' organize de Marija Belošević, Zagrebo, kaj fine, la 15an de decembro, en Triesto, okaze de la Zamenhof-Tago. En tiuj 3 aranĝoj mi havis la ĝojon revidi kelkajn membrojn: dankon al ili pro la partopreno!

En ĉi momento nenio estas antaŭvidebla, tial ni ĉiuj kune varme esperu, ke ĉi tiu koŝmaro en baldaŭa estonteco ĉesos kaj fine ni ĉiuj liberiĝos el tiu peniga virusa ĉenaro kiu limige estris ĉies vivon.

La jaro estis aparte malĝojiga ankaŭ pro la perdo de niaj amikoj filatelistoj: SUZUOKI Ziro, MAEKAWA Haruja, DRUCKER Gert - kiuj tamen daŭre vivos en niaj koroj.

Plejlaste forlasis nin, pro kronviroza infektiĝo, nia longjara fidela membro Vladislav HASALA (05/1951-11/2020). Li estis ĉeĥa esperantisto, ekskomitatano de ĈEA, SAT-ano, motoro de la E-movado en Strážnice (AEST 1991, 67^a SAT-Kongreso 1994) kaj kompetenta filatelisto, ofta partopreninto en naciaj kaj internaciaj ekspozicioj per esperantotemaj eksponaĵoj, per kiuj li gajnis plurajn unua-premiojn. Li gvidis Esperanto-sekcion ĉe Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj kaj iaman sekcion de kolektantoj ĉe Ĉeĥa E-Asocio. En la fondojararo de ĈEA, 1969, li fariĝis estrarano de la junulara sekcio, kaj poste de ĈEA. Lia ekzemplodona agado donis bonegan rezulton, ĉar lia filino Andrea esperantistiĝis kaj nuntempe estas estrarano de ĈEA.

Kara Amiko, ripozu en Paco! Ni ne forgesos vin.

Antaŭ ol fini, kun ega mia bedaŭro, mi devas tuŝi tiun malagrablan punkton de kotizaj pagoj. Pluraj estas kiuj *forĝesis* plenumi sian membredevon. Mi nur aldonas ke, se iu ne plu deziras resti ano de nia Ligo, tre ĝentile min informu. Dankon!

Al ĉiuj mi bondeziras pli feliĉan, pli sanan kaj pli pacan 2021^{an} Jaron. Estu sanaj kaj evitu ĉiel la kronviruson!

Estime, Elda Doerfler

KIAJ PATROJ, TIAJ FILOJ

JAMES REZENDE PITON

En Brazilo ni havas diraĵon “Frukto falas ne tre malproksime de la fruktarbo”. Tio signifas, ke gefiloj pli-malpli sintenas aŭ sekvas vojon kiel siaj gepatroj (en bona aŭ malbona senco). Ni prezentas trovitajn poŝtkartojn, kiuj montras sin elstaraj ekzemploj pri tio en Esperantujo.


ĈU KALIGRAFION ONI POVAS GENETIKE HEREDI?

Tiu ĉi unua karto ne povus esti pli elstara ekzemplo kaj same eksterordinara estas la cirkonstanco kiel mi atingis ĝin. Traserĉante (en reta aŭkcio) korespondaĵojn el Varsovio de la komenciĝanta 20-a jarcento, kun la specifa celo eventuale trovi ion de Zamenhof, mi foliumis ilustritan liston de tutaĵoj. La kaligrafio sur unu el la tiam plej ofte uzataj rusaj tutaĵoj, adresita en Esperanto, kaptis mian atenton, ĉar tiuj literoj iel impresis al mi tre familiaraj: ili estis tre similaj al tiu de Zamenhof! Ĉu zamenhofaĵo kontraŭ nur du usonaj dolaroj?! La dorsflanko tiam ne estis montrata kaj mi tion petis de la vendisto. Li rapide reagis kaj mia supozo estis konfirmita, por mia granda emocio - la fama stampo de Zamenhof kun adreso en strato Dzika! La usona vendisto ne esploris tiun nomon. La aŭkcio-tempo finiĝis kaj kiel sola



proponanto mi akiris ĝin, ja kontraŭ la komenca prezo.

Oni konas dekojn (centojn?) da korespondaĵoj de Zamenhof, i.a. responde al aliĝpetoj al la sinsekvaj “Adresaroj de Esperantistoj”. Ĉi tiun mian karton tamen ne verkis Zamenhof mem, rimarku. La karto estis enpoŝtigita la 6-an VIII 1905 kaj subskribita ne de li, sed de lia filo Adamo (1888-1940). Atentu pri la dato: temas pri la semajno de la Unua UK! Paĉjo kaj panjo en tiu semajno troviĝis en Bulonjo ĉe l’ Maro, inter la 688 kongresanoj el 20 landoj. Adamo restis hejme kaj faris por la patro sekretarian laboron, en frua aĝo. Tio havas por mi grandan signifon, kvazaŭ historia atesto - tiam Adamo, apenaŭ 17-




jara, kunlaboris kun la patra rutino por nia “afero”. Li skribis: “E.(stimata) S. (injero), vi estas enskribita en Adresaro de la Esperantistoj sub N. 12111. Vi ricevis la Adresaron kun la dua paĝo malplenigita tial, ĉar vi en via letero (unua) petis nur pri elsendo de Adresaro. Por [D-ro L. Zamenhof] Adam Zamenhof”

ESPERANTO ESTAS... MI

La dua ekzemplo estas kurioza elmontro de patro kaj filo ligitaj al Esperanto. En la provinco Cádiz, Hispanio, José Garzón Ruiz (1871-1955) estis konata advokato kaj skoltestro. Li gvidis kursojn, verkis lernolibrojn kaj fondis E-gazetojn. Jen

foto de li sur poŝtkarto el serio pri gravuloj de la frua hispana E-movado. Ĝi estis sendita de li mem al Francio en 1909.


Sur la alia bildkarto, oni vidas foton de filo de Garzón Ruiz, sepmonata bebo je la nomo... F. de A. ESPERANTO GARZÓN. La bebo havas antaŭ si numeron de la gazeto de UEA. La karto ja estas reklamilo de “Gazeto



Andaluzia” (fondita kaj redaktata de la patro, kun dek numeroj aperintaj nur en 1910!). En la numero 2 de tiu gazeto (Feb. 1910), disponebla en <http://bitoteko.esperanto.es>, mi malkovris noton, ke la baptifesto de la “nova samideano” kunvenigis



multajn esperantistojn la 27-an de Januaro. Oni ne trovas en la reto pliajn informojn pri tiu filo. Ĉu li atingis plenaĝon kaj entute interesiĝis pri Esperanto?



MIA PATRO PETIS

La tria ekzemplo estis trovita de nia prezidantino Elda kaj venas el alia respektinda E-domo, en Rio-de-Janeiro. Ismael Gomes Braga (1891-1967) estis unu el la plej elstaraj brazilaj esperantistoj. Danke al li, la granda eldona strukturo de Brazila Spiritisma Federacio ekde 1937 aplikis en la eldonado ne nur de fakaj libroj, sed en la produktado de E-lernolibroj kaj vortaroj, kio ebligis, ke brazilanoj, ne nur spiritistaj, trovu alireblan kaj bonkvalitan lernomaterialon en la tuta lando, tra la jardekoj.

La karto el 1937 portas stampon de la sola filo de Ismael, naskita en 1923 kaj registrita kun la signifaj antaŭnomoj Laŭro-

Zamenhof. En tiu ĉi karto, tutaĵo el la brazila serio de turismaj vidindaĵoj kun portugala kaj Esperanta priskriboj, Laŭro respondas nome de la patro al iu, kiu petis ekzempleron de la poŝtmarko eldonita en 1936 okaze de la Naŭa Brazilo E-Kongreso en Rio. Rimarku, ke Laŭro-Zamenhof tiam estis tre juna - 14-jara! Li ne lasis E-movadajn spurojn, kvankam tiam kaj tiam mi trovas liajn korespondaĵojn. Laŭro-Zamenhof havis 3 gefilojn, vivis kaj forpasis en Rio en 1981.



Kiel patro de adoleskantaj E-denaskuloj, mi havas la esperon, ke ankaŭ ĉe mi la fruktoj ne falos tre malproksime...



LABORISTA OLIMPIKO EN 1931

Bert BOON



ENKONDUKO

Inter la du mondmilitoj esperantistoj serĉis kontakton kun la mondo de la sportoj, ĉefe de la moderna olimpiada movado, fondita de Pierre de Coubertin, la iniciatinto de la unuaj modernaj olimpiaj ludoj en


Parizo, en la jaro 1896.

Fine de la 19^a jarcento laboristaj partioj kaj asocioj retiriĝis de la “etburĝa” sporta mondo. AKTIVE SPORTI estu preparado al vivo en socialista komunumo. La unua ARBEITER OLYMPIADE okazis en 1925 en Germanio (Frankfurt am Main).

Por vere tuŝi la temon de ĉi artikolo, ni devas nepre enfokusigi la duan laboristan olimpiikon, okazintan en 1931 en Vieno (Aŭstrio).

PRISKRIBO DE LA OLIMPIA GLUMARKO

Okaze de tiu evento la esperantistaro eldonis “garantifondan markon”, surbaze de la porokazaj germanlingvaj afiŝoj kaj poŝtkarto.



Dekstre: la esperanta flanko.

Maldekstre: la originala germana afiŝo (aŭ poŝtkarto). Montrata estas gimnasto kun mallonga ruĝa sportkuloto. Per la maldekstra mano li levigas globon en dentorado, per la dekstra li ĉirkaŭpremas martelon.

Fone oni vidas ruĝajn flagojn, inter kiuj estas flago kun la teksto

“2. ARBEITER OLYMPIADE”. Cetere, partojn de panoramo de la urbo Vieno.

La mezuroj de la marko estas 31mm x 40mm, laŭ la glumarka katalogo de Richard Hirsch.

KION SIGNIFAS “GARANTIFONDA MARKO”?

Provizore mi ne povas respondi sen iu dubo. Tamen, nia samideano Marc Vanden Bempt el Loveno (Belgio) tre verŝajne prave klarigas la signifon:

“Kiam ni (la asocio ESPERANTO 2000 el Belgio) ekorganizis la IJK-n en 1982, ni eksciis pri iu “garantia fonduso”. Tio ne estis vera (leĝa) fonduso, sed nur garantia deklaro kiun ni povis subskribigi de konatuloj, simpatiantoj, k.s. Ili per ĝi deklaris ke, se la IJK alportos (ĉar oni subskribos antaŭ julio 1982) malprofiton, tiam ili pagos iun sumon, menciitan sur la formulareto, por malpliigi tiun malprofiton. Tio do donis iom da certeco al la Loka Kongresa Komitato. Feliĉe ni fine ne bezonis ilin...”

Marc ankaŭ serĉis per Guglo kaj trovis interesan informon pri la laboristaj olimpikoj i.a. en “Aŭstria Esperantisto” 1930, n-ro 62, feb, kiu mencias artikolon en “Stunde”, 19.XII: “2. Laborista Olimpiado okazos en Vieno 1931. Ĝus oni eldonis apartajn glumarkojn kun jena enskribo: Garantifonda marko por la 2. Laborista Olimpiado Vieno 1931.”

Ankaŭ sinjoro Bernd Krause en la artikolo “Esperanto kaj la Olimpikaj Ludoj – Aspektoj de kontakto” (en “Informilo por interlingvistoj” p. 18), mencias la specialan markon, sed bedaŭrinde ne klarigas la rolon aŭ funkcion de tiu marko.

Marc krome mencias paĝon pri iu “Waschsalon Karl-Marx-Hof”, kiu ĉi-jare (2020) ĝis venontjare organizas ekspozicion pri la olimpiko en Vieno. En la ekspozicio estas montrita la plej eta ekspoziciaĵo: ĉi tiu rara garantia marko!



LA POŝTMARKOJ TLT-VUJNA 300 DINAROJ**38-a Universala Kongreso de Esperanto 1953**

Verkis itale: Veselko GUŠTIN

La historio de la poŝtmarko TLT-VUJNA / Teritorio Libera de Trieste – Administrado Popola Armeo Jugoslavio / Esperanto-Kongreso / je 300 dinaroj, estas jam tre malnova.

Unufoje ni trovas la novaĵon en *Nova filatelija (NF)*, n-ro 8^a - 1953: “La 15- kaj 300-dinaraj poŝtmarkoj estis presitaj por la FLRJ / Federacia Popola Respubliko Jugoslavio, kaj estis eldonitaj ankaŭ por la teritorio / TLT / de Koper.

Krome, oni povas trovi en la sama numero de *NF*, ke: “La filatela klubo de Koper / Capodistria (*itale*) eldonis unuataĝan koverton kun la 15-dinara poŝtmarko.”

En la sekva n-ro 9^a (*NF* aperas ĉiumonate) oni legas: “La 15-dinara poŝtmarko estas malhelverda, la surpriso estas ruĝa. La 300-dinaraj poŝtmarkoj, bedaŭrinde, ne povas esti priskribitaj, ĉar ankoraŭ ni ne vidis ilin. Ĉe la filatela poŝta ĝiceto troveblas, por publika vendo, nur 10 pecoj, el kiuj unu estas misa. El la tuta emisio (ŝajne 12 000 pecoj) 8 000 ekzempleroj estas venditaj en Usono, 2 000 estas aĉetitaj de komercistoj el Triesto. La cetero estas... kiu scias kie.”

Dum ni legis pri la poŝtmarko, ni ne multe sciis, krom ke tiuj estis jam eldonitaj la 21^{an} de julio 1953. La sekva novaĵo estos skribita nur post 4 monatoj en *NF* n-ro 1^a - 1954: “La valoro de 15 dinaroj estas eldonita (ni ankaŭ ricevis la poŝtmarkojn en filatelaj societoj!), sed la samo ne povas esti dirata pri la valoro de la 300-dinaraj.”

Jen la detaloj:

1. *violkolora poŝtmarko; eldonnombro 12.000 pecoj en folietoj el po 12;*
2. *lila (=siringokolora) poŝtmarko; eldonnombro 3 000 pecoj en folietoj el po 8;*
3. *la valoro de la punkto 2. kun margena skribaĵo ruĝkolora: “Esperantski Kongres / 38-a Universala Kongreso de Esperanto 1953 / Congresso dell’Esperanto”.*

La historio de tiuj ĉi tri eldonoj (la lasta estis vendita nur kiel folieto) estos klarigita pli poste.

Interesa estas la fakto, ke ĉi tiun historion solvis la eldonisto de la Katalogo *Zumstein*, kiu klarigis pri la rezultoj en la revuo *BBZ* 1/1954:

Artikolo en BBZ

Esperanto-Kongress-Marken Triest Zone B. Ein grober Unfug wurde mit der 300 Dinar-Marke, mit rotem Aufdruck STT VUJNA, getrieben. Bekanntlich wurde diese 300 D.-Marke in Kleinbogen von 12 Stück mit weissem Bogenrand gedruckt. Die Auflage betrug nur 12 000 Marken, 1000 Kleinbogen. — Anfang Oktober ging uns von befreundeter Seite ein Achte-Kleinbogen mit rot überdrucktem Bogenrand zu. Der rote Bogenrand-Aufdruck lautet «Esperantski Kongres / 38-a Universala Kongreso de Esperanto 1953 / Congresso dell'Esperanto». Der Einsender schrieb, dass es 250 solcher Kleinbogen gebe (rückseitig von 1—250 nummeriert), die Farbe sei verschieden von der Marke aus dem Zwölfer-Bogen, d. h. sie sei lila statt violett. — Nun gut, es ist ein kleiner Farbunterschied feststellbar, indem die Marken aus dem Achtebogen etwas heller erscheinen. — Weiter wurde uns mitgeteilt, dass 250 Stück Achtebogen von einem Amerikaner gekauft worden sind. — Das Rätsel war damit aber noch nicht gelöst! Woher stammen diese 250 Achtebogen, wer hat den Druckauftrag dazu gegeben, warum musste der Bogenrand überdruckt werden und wo und von wem sind die 250 Stück Achtebogen verkauft worden und zu welchem Preise? Dies alles sind Fragen, die für den Sammler von Interesse sind, besonders wenn für die Einzelmarke aus dem Achtebogen heute 35—40 Fr. verlangt werden. — Um nun in diese mysteriöse Angelegenheit Klarheit und die nötige wahrheitsgetreue Erklärung bringen zu können, hat sich unser Neuheidendienst mit neun präzisierten Fragen an die PTT der Zone B gewandt.

Mit Schreiben vom 19. Oktober 1953 wurden unsere neuen Fragen etwas summarisch beantwortet, immerhin wurde uns eine genügend ausführliche Antwort erteilt, um über die «Entstehungsgeschichte» der Achtebogen Auskunft geben zu können. — Der Einfachheit halber geben wir nachstehend den Wortlaut des Antwortschreibens bekannt:

«Bei der Hauptdirektion PTT Beograd wurden von uns 15 000 Stück Marken (4 Din. 300) bestellt. Versichtlich hat aber die Hauptdirektion PTT bei der Druckerei nur 12 000 Stück Marken bestellt, die auf Zwölfer-Kleinbogenpapier gedruckt waren. Das Manko von 3000 Stück wurde bei uns erst bei der Uebnahme festgestellt und sofort reklamiert. Die Druckerei hatte aber inzwischen das übrige Papier für die jugoslawische Auflage in Achte Kleinbogen schon zerschnitten, welche Papierbogen dann auch für die nachträglich erhaltene unsere Bestellung beziehungsweise Manko gebraucht wurden.

Es sind also von uns keine verschiedenen Kleinbogen bestellt worden.

Auch betreffs der Farbdifferenz der beiden Kleinbogen — die übrigens nur bei genauer Betrachtung bemerkt wird — ist bei der Bestellung nichts erwähnt worden. Diese ist also nur der nicht ganz genauen Farbmischung zuzuschreiben.

Auch haben wir keine Bogen erhalten, deren Rand mit roter Aufschrift versehen wäre und es ist uns unbekannt, wer der Auftraggeber sein sollte. — Jedenfalls werden wir das Erscheinen des Achtebogens mit roter Inschrift — der widerrechtlich als Achteblock bezeichnet wird — in unserem Amtsblatt widerufen.

Die Marken wurden an den Postschaltern zu Nominalpreisen verkauft. — Die Auflage ist derzeit schon vergriffen.

Hochachtungsvoll sig. Direktor PTT.»

Es muss noch gesagt werden, dass die 300 Din.-Marken blau von Jugoslawien in Achtebogen gedruckt sind, während die violette 300 Din.-Marke Triest Zone B (12 000) in Zwölferbogen ausgegeben wurde.

Aus vorstehenden Angaben geht klar hervor, dass der rote Bogenrandaufdruck von privater Seite gemacht worden und daher philatelistisch wertlos ist. Philatelistische Mache wird im «Zumstein» nicht katalogisiert.

“Grandaj malregulecoj okazis rilate la 300-dinaran poŝmarkon kun ruĝa surpriso *STT VUJNA*. Kiel konate, tiuj poŝmarkoj estis presitaj sur folieto po dek du ekzempleroj kun blanka marĝeno. La oficiala eldonkvanto estis nur 12 000 poŝmarkoj, t.e. entute 1000 folietoj.


Komence de oktobro ni ricevis de amiko la novaĵon pri kroma okpoŝmarka folieto kun ruĝa surprisaĵo ĉe la marĝeno: “*Esperantski Kongres / 38-a Universala Kongreso de Esperanto 1953 / Congresso dell'Esperanto*”. La raportinto (*la amiko*) skribis, ke ekzistas 250 tiaj folietoj (dorsflanke numeritaj de 1 ĝis 250) kies koloro estas malsama ol tiu de la 12-poŝmarka folio, t.e. siringkolora, anstataŭ violblua.

Fakte, la eta kolordiferenco estas rimarkebla, ĉar la okpoŝmarka folio estas iom pli hela. Sekve oni ricevis la informon, ke la 250 okpoŝmarkaj folietoj estis aĉetitaj de iu usonano. Tamen la enigmo ne estas ankoraŭ tute klarigita!”

La eldonisto de la *Zumstein*-katalogo montriĝas vera profesiulo, ĉar poŝmarko estas poŝmarko se ĝi estas poŝte uzebla, se vendita ĉe poŝta ĝiceto kaj alirebla por kiuj volas ĝin aĉeti! Tiel tuta serio da pravigeblaj demandoj: “Kia estas la origino de ĉi tiuj 250 folioj; kiuj presis ilin; kial la marĝenoj devus esti surprisitaj

kaj de kiu iu estis aĉetinta la 250 foliojn (el 8 pecoj) kaj je kiu prezo?”

En la pasinteco la *Zumstein*-katalogo (kiel la *Michel*) ĉiam ignoris



1. folieto kun 12 ekzempleroj

“privatajn” eldonojn, kaj neniam indikis ties prezon. Estas ankaŭ interese rimarki, ke en la du *NF*-artikoloj, bedaŭrinde, nenion oni legis pri tiurilataj duboj de la katalogo-eldonisto. Se la respondo estis ricevita en oktobro 1953, tio signifas, ke la surprisitaj poŝtmarkoj estis jam “vendotaj”, sed nur ĉe filatelaj komercistoj kaj ne ĉe poŝtaj giĉetoj.

Ni daŭrigu: “Ĉiuj ĉi demandoj gravas por la kolektanto, precipe ĉar nun oni postulas por unuopa peco el la ok-poŝtmarka folieto inter 35 kaj 40 svisaj frankoj. Pro ĉi tiu mistera okazo kaj por doni ĝustan kaj malfalsan klarigon, nia servo pri novaj emisioj per naŭ precize vortigitaj demandoj petis detalan respondon al la Poŝta Direkcio de TLT-Zono B.

En la skriba respondo de la 19^a de oktobro 1953, ni ricevis ian nebulan, sed sufiĉe ampleksan klarigon provantan priskribi “la historion de la naskiĝo de la ok-poŝtmarka folio”.

Jen, koncize:

“Al la Ĉefestraro de la Beograda Poŝtoŝicejo estis menditaj 15 000 pecoj (de la 300-dinara poŝtmarko). La Centra Poŝta Direkcio de Beogrado sur la preskontrakto misŝkribis kaj reale mendis nur 12 000 poŝtmarkojn, presitajn en folietoj el 12 pecoj. La mankon de 3 000 pecoj oni malkovris nur je la liverado de la materialo: tio estis haste kontestita. La presejo posedis la restantan paperon, jam prete tranĉitan por la jugoslavia eldono, t.e. folietojn el ok poŝtmarkoj. Tiuj folioj estis poste utiligitaj por niaj mankantaj menditaĵoj / TLT-VUJNA. Ni do ne mendis alitipajn foliojn. Koncerne la diferencojn en la koloroj de la du folioj, kiuj interalie estas rimarkeblaj nur post atenta observado, ni ne estis petintaj. Do, tiuj malsamecoj estas imputendaj al malsama kolormiksaĵo. Plie, ni ricevis neniun folieton kun ruĝa skribaĵo marĝena kaj tute ne scias, kiu estis la komisiinto. Tamen tiu stranga okazaĵo de la ok-poŝtmarkaj folioj kun ruĝa surpriso marĝene, kio estas kontraŭleĝa ĉar priskribita en nia oficiala gazeto kiel poŝtmarka folieto, estos nuligita. La oficialaj poŝtmarkoj estis venditaj ĉe la poŝtaj giĉetoj laŭ la nominala kosto. La eldonkvanto intertempe elĉerpiĝis.

Korajn salutojn, la direktoro de PTT / de TLT-VUJNA/, persone” Rimarkindas, ke la 300-dinaraj, bluaj poŝtmarkoj por Jugoslavio estis presitaj sur folietoj el po ok ekzempleroj, dum tiuj 300-dinaraj siringkoloraj estis por Triesto Zono B (12 000) presitaj sur 12-pecaj folietoj. Pro la su-praj asertoj, klaras, ke la ruĝe surprisitaj tekstoj sur la folia marĝeno estis komisiitaj de privatuloj, tial ili havas nenian filatelan valoron. Ajna aĵo kun nur verŝajna filatela aŭtentikeco neniam estos katalogita en “Zumstein”.

Aldonendas, ke, post la unua presado de 12 000 pecoj, la kliŝon (de la 12-ekzemplera folieto) oni estis puriganta por la presado de kromaj 3 000 jugoslaviaj poŝtmarkoj. Sed dum tiu faro la malsupra parto difektiĝis; tial la presado de la aldonaj folietoj estis daŭrigita per la damaĝita kliŝo kiu povis reprodukti nur ok-poŝtmarkajn folietojn.

Ĉi tiu estis la oficiala klarigo de la poŝta direktoro de Koper (*Capodistria, itale*) kaj ĝi estas ankaŭ la nura vera, serioze pripensita de ambaŭ naciaj katalogoj *Slovenika* kaj *Jugomarka*, samkiel de tiuj eksterlandaj *Michel* kaj *Zumstein*. Kompreneble, la afero tute alie sin prezentas por la italaj komercistoj. Ili tutsimple ofertas en ĉiuj katalogoj *Sassone*, *CEI*, *Unificato* kaj aliaj tiun ĉi “folieton” kun la marĝena surskribaĵo - kiel raran filatelan specialaĵon. Tamen strangas la faka



2. Folieto kun 8 ekzempleroj

katalogo *Tergeste*, 1955, de Bornstein, kie tiuj folietoj ne estas listigitaj!? En la retejo *eBay* (antaŭ kelkaj jaroj) la 300-dinaraĵ poŝtmarkoj TLT-VUJNA kun la marĝena skribaĵo vendiĝis je 395 eŭroj, alia sen ĝi troveblas (ankoraŭ hodiaŭ) kontraŭ minimume 60 € (la nominala valoro estis ĉirkaŭ 6 frankojn)?! Kion tio ĉi signifas? La komercistoj, posedantaj ĉi folietojn, sendube havas intereson, ke ili estu oficiale aŭtentikaj filatelaj.

Se ni provus respondi la demandojn de la eldonisto de la *Zumstein*-katalogo, tiam ni povus diri:

- La surpreron iniciatis privatuloj, do eĉ ne gravas kie.
- La folietoj kun marĝena skribaĵo ne estis venditaj en la poŝtaj oficejoj de la *TLT-Zono B*, tial ne estis poŝte uzataj.
- Ĉi folietoj/poŝtmarkoj ne estis folietoj/poŝtmarkoj de la *TLT-Zono B*.

Tamen restas dubo: se veras, ke la poŝtejo en Koper ricevis entute 3 000 poŝtmarkojn (aŭ 375 folietojn kun 8 ekzempleroj), ĉu la 259 folietoj kun marĝena skribaĵo apartenas al iu kroma eldonado/presado?

Kion konsili al aĉetontoj de la 300-dinara Esperanto-poŝtmarko *TLT VUJNA*? Se ni dezirus havi aŭtentikan poŝtmarkon en nia kolekto, tiam estas serĉenda poŝtmarko kun *blankaj* marĝenoj (folietoj el po 12 aŭ 8 ekzempleroj), aŭ sen marĝenoj nur violaj.

(folieto kun 12 ekzempleroj). Se la siringokolora estas senmargena, ĉu jam estas io suspektinda?

Bibliografio:

1. *Marke zone B i Slobodne teritorije Trsta /Francobolli della Zona B e del TLT Zona B/, JUFIZ XII, 21-26.6.2004* (tr. Poŝtmarkoj de la Zono B kaj TLT Zono B).
2. *Damir Novaković, Marka za zračnu poštu zone B STT-a/Francobollo per la posta aerea della Zona B/ izdana prigodom 38. Svjetskog esperanto kongresa, Hrvatska filatelija, 1/2007, pp18-27* (tr. Flugpoŝta marko de la Zono B).
3. *Esperanto-kongress-Marken Triest Zone B /Francobollo per il TLT Zona B Congresso dell'Esperanto/, Brenner Briefmarken-Zeitung, BBZ, 1/54, pp. 13, traduzione dal tedesco di Igor Pirc. (Poŝtmarko por la TLT Zono B Esperanto-Kongreso, tradukita el la germana lingvo de Igor Pirc).*

Tradukis de la itala, Elda DOERFLER.

Lingve kontrolis Albert BOON kaj James REZENDE PITON.



Tutunue, nome de ELF-AREK, mi direktas niajn plej varmajn dankojn al la Estimataj retejestro Roberto MONTICINI kaj kunlaboranta filatela verkisto Veselko GUŠTIN pro la ĝentila permeso kopii el la retejo (www.ilpostalista.it) la artikolon pri la jugoslava E-poŝtmarko 1953, traduki kaj aperigi ĝin en nia organo, sed ne nur. S-ro Roberto



Unua-taga koverta - Koper / Capodistria

Monticini tuj proponis al ni konstantan kunlaboron, metante je dispono la paĝaron, kie aperigi artikolojn pri Esperanto lige kun filatelo, kaj itale kaj esperante. La artikoloj aperos ekde januaro 2021.

Bonvolu viziti la ttt-ejon kaj ankaŭ sendi al mi kontribuaĵojn. Jam pretas listo varitema. Jen niaj proponoj pri ontaj artikoloj: gravas, ke oni ĉiam prezentu bildojn de filatelaĵoj koncernaj la temon! Zorgas pri verkado de la artikoloj nia kunligano Alessandro Bellucci. Se vi havas intencon kunlabori, nepre min kontaktu!

1. Vivo de L. L. Zamenhof
2. La unuaj jaroj de la movado
3. La movado
4. ELF-AREK k.m.a.

Se vi havas sugestojn/proponojn, ni ĉiuj estas estas je via dispono.

La Geredaktantoj




Tiun ĉi folieton *VIENNAFIL AUKTIONEN* aŭkciis je la startprezo de 1 900 € en 2020.

LA MONDO ESTAS BELA, ĈAR TRE VARIA!

ELDA DOERFLER

Nekredebla hazardaĵo! Kio ĝi estas? Ĉu temas pri E-pm-o? Jes, jes, nu, tamen ĝi estas unu el tiuj IPM-oj, kiuj de tempo al tempo aperas en nia Esperantujo. Sed, kio estas sur ĝi? *Molossia Poŝto – D-ro L. L. Zamenhof – Kreinto de Esperanto 1859-2019.*



Dekstrangule, supre, VL 1.- Bah! tiu nomo *Molossia* diras nenion al mi, tial mi ekserĉu; sed kie? nu, mi provu per Vikipedio, eble...

Nekalkuleblaj informoj aperas: tute ne eblas koncize paroli pri ĉio. Sed nepre diskon-igendas almenaŭ io, por nia propra ekscio pri ia libera aŭtonoma respubliko, unu el la plej malgrandaj landoj en la mondo, kiu tamen havas sian ŝtatformon, bankan sistemon kaj valuton, fervojon, poŝton, mararmeon kaj civitanojn (ĉ. 27)!

Kaŝita en Norda Nevado, ĝi estis imagita kaj realigita de

Lia Ekscelenco Kevin BAUGH en majo 1977. Tiu ĉi mikronacio situas proksime al la montoĉeno Nevada, en la Dayton-Valo, la plej granda seka nord-amerika regiono, apud la rivero Carson. La teritorio havas iom pli ol 11 akreojn (1 akreo = ĉ. 4000 kvadrataj metroj). Ĉe la landlimo staras ŝildo, kiu sciigas, ke “trans ĉi tiu punkto vi ne plu estas en usona teritorio”. Por eniri el alia lando, validas pasportaj kaj kutimaj alilandaj leĝoj, kaj la prezidanto bonvenigos vin ĝoje markante vian pasporton per unu el la plej maloftaj poŝtmarkoj de la “Respubliko de Molossio”. Granda absurdaĵo estas, ke la respublikestro estis militanta kontraŭ Orienta Germanio, pro la fakto ke, kiam li rezidis en la Okcidenta parto kun la Usona armeo, pro la oftaj germanaj militekzercadoj li multon suferis pro maldormemo. Sed tio ĉi estis nur unu el kelkaj motivoj de lia kontraŭstaro al Orienta Germanio.




La flago de Molossio estas horizontala kaj trikolora: bluo, blanko kaj

verdo. La bluo reprezentas la forton de la nacio kaj la ĉielon, la blanko la purecon kaj ĉirkaŭajn montojn, dum la verdo la prosperon kaj molossian pejzaĝon.

La nomo de ĝia valuto estas *Valora*, dividita en 100 *futtrus*-ojn, ligita al valoro de la kuketa pasto PILLSBURY, usona kompanio malfondita fine de 1900. Aktuale la kurzo de 1 Valora egalas al 1 usona dolaro.

La moneroj kaj monbiletoj, kaj la poŝtmarko estas aĉeteblaj ĉe la retejoj: <http://www.molossia.org/bank.html> kaj

<http://www.molossia.org/postal2.html>



Asertas la Prezidanto: *Nia misio estas trakti solidajn monajn kaj financajn politikojn celantajn prezstabilecon kaj krei medion por daŭripova ekonomia kresko.*

Plie, en la retejo, eblas spekti plurajn filmetojn/videojn, amuzajn, du eĉ en Esperanto, kaj ekscii pri la poŝta raketo, ion pri la Prezidanto kaj ties Damo k.a. Se vi havas iom da libero, meritas dediĉi al tio... eĉ dek minutojn de via tempo, precipe por distriĝi en ĉi malhela periodo kaj... iom rideti: vidu ĉe <http://www.molossia.org/movies.html>.

Tamen kio plej estas ridiga, estas la fakto, ke malgraŭ ĉio ĉi mi decidis aĉeti en *eBay*-aŭkcio la poŝtmarkon, kiun mi rapide ricevas... de nekonato el Francio. Kiom mi pagis ĝin? 4 eŭrojn, inkluzive de sendokosto. Alvenas iun tagon koverta, el urbo Troyes, sur kiu algluitaj estas du pm-oj, unu franca kaj alia el *NOVATROIE*-a, sur kiu estas la bildo de la konsulo en Burkino. Ho, nee! Ĉu alia mikronacio? En la koverta mi trovas belaspektan leteron, surhavantan ian emblemon kaj kaptitolitan “Etat Indépendant de NovaTroie”, kiu estis sendita de la Oficejo de la Guberniestro kaj subskribita de la Guberniestro mem. Nu, gravega letero kun signaturo de gravegulo! Post la subskribo, estas algluita saketo el celofano kaj en ĝi jen la Zamenhofa pm-o: mezuroj, 44mm x 65mm; nominala kosto, Valora 1.-; koloroj, pluraj nuancoj, sufiĉe malhelaj, inter bluo kaj verdo. Ĉu mi est- is seniluziiginta? Ho ne, tute ne! Mi ŝatas tiajn strangaĵojn: ili estas la ĝusta dozo da pipro por la sengustaj momentoj de mia vivo!

ESTAS ĈIAM IO NOVA!

Mark HAMME, Usono

Tiuj vortoj estas la artikola titolo de William RUH, verkisto por *The American Stamp Dealer & Collector* - Usona Poŝtmarka Distribuanto kaj Kolektanto - fama, prestiĝa kaj kosta filatela revuo. La longa artikolo temas pri Esperanto kaj Esperanto-kolektoj, sep plenaj paĝoj kun 18 koloraj ilustraĵoj. Plie surprizis, ke la revukovrilo estas nenio alia, ol kopio de la anonco pri la 9^a Universala Kongreso, kies desegnaĵo prezentas junan viron portantan terglobon sur kiu la verda stelo inter la landoj.

Kiel *La Verda Lupeo*, tiu revuo ĉiam elstaras pro la publikigitaj pm-oj kaj pm-kovertoj. La *Ruh*-a artikolo parolas unue pri *La historio de Esperanto* (tiel skribite) kaj defendas la internacian lingvon kontraŭ Ido kaj ĉiuj aliaj mortaj absurdaĵoj. Elstaras frua ekzemplo de E-glumarkoj sur poŝtkarto kaj kovertoj, kiuj surhavas la rusajn E-pm-ojn, inkluzive tiujn poŝtkartojn kun langetoj, kiujn la Danciga E-Asocio elpensis. Tiuj ebligis la sendantojn meti la kartojn en tajpmaŝinojn. La Danciga poŝtisto - kurioze! - uzadis memorigan stampon pri la Universala E-Kongreso de 1927. Tiujare Rusio eldonis alian pm-on prezentantan Zamenhof-on, kaj estis uzataj rusiaj glumarkoj. La elstara poŝtkarto estas anonco pri Esperanto, kaj la sendinto skribis legeblan E-mesaĝon pri la kunveno.

Sur la sekva paĝo estas aliaj ekzemploj pri kovertoj kaj presaĵoj. Ape- ras ankaŭ unuataga koverto de aŭstria pm-o pri Esperanto de la jaro 1949. La lasta paĝo prezentas fotojn de jugoslava pk-o memoriganta la 38^{an} Universalan Kongreson (1953) kun rilataj poŝtmarko kaj stam- po. La mesaĝo sur la jugoslava poŝtkarto estas legebla kaj temas pri la kunveno. Pli sube estas tutaĵa koverto eldonita en Rusio, okaze de la 100-jariĝo de Esperanto (1987).

La gazeto, en kiu aperas tiu artikolo, estas la 137^a numero, t.e. novem- bro-decembro 2019. Eble per *americanstampdealer.com* vi povos vidi aŭ akiri kopion de la artikolo. Mi jam dankis la redaktoron pro ĝi kaj lin informis pri la E-filatelistoj kaj E-kolektantoj de ELF-AREK.

Al ELF-AREK kaj la usona kaj aŭstralia gazetoj mi sendis mian rapor- ton kune kun miaj elkoraj salutoj! Ĉiam bonvenigas leterojn kaj poŝt- markojn via usona samligano Mark HAMME / #33391-379 / U. P. Tuc- son / P.O. Box 24550 / TUCSON, AZ 85734 / Usono

LA STELO-SIMBOLO: NE NUR ESPERANTISTA! (1)

Albert BOON

ENKONDUKE

La sensperta filatelisto kiu decidas kolekti poŝtmarkojn kun stelo-simbolo ne konscias, en kiun kaŝitan ĝardenegon li eniras. Jen aro da poŝtmarkoj kiuj rakontas pri ĉielaj steloj, kometoj (kiel Halley) aŭ stelaroj kiel la Suda Stelaro sur tiom multe da brazilaj poŝtmarkoj.



La kometo de Halley



La Suda Stelaro

Jen, aliflanke por aliaj kolektemuloj, alia aro da markoj, kiuj ilustras la faman miton pri la tri reĝoj en la dezerto, kiuj lasis sin gvidi al Bet-Leĥemo per “brilega stelo”. Ne malpli ol kvin tiamaj fenomenoj povas klarigi la aperon de tiu “stelo”: la kometo de Halley, la konjunkcio de Marso-Jupitero-Saturno, la aperiĝo de la novao de la Kaprikorno, eĉ la trafiko de la kometo Aglo aŭ la konjunkcio de Jupitero-Venuso ... Problemo do por fiksi la naskiĝtagon de Jesuo!



La “stelo” de Bet-Leĥemo



La stelaro “Kaprikorno”

STELO-POŝTMARKOJ EN LA TUTMONDA FILATELO

Kiel geometriaj bildoj, simboloj aŭ signoj, en la tipografio astroj estas ege kutimaj. La klasikaj poŝtmarkoj prezentas amason da diversaj

tipoj. Ĝisostaj kolektantoj evidente penas altigi la valoron de siaj kolektoj per specimenoj el la pasintaj jarcentoj. Ne malhaveblaj: la unuaj poŝtmarkoj de Finnlando, kun steloj en la blazono, same kiel tiuj el Hamburgo (Germanio). Raraĵoj ankaŭ estas la steletoj sub la Bovaj kapoj de la unuaj eldonoj de Rumanio. Sekve la turkaj poŝtmarkoj de la Otomana Imperio (stelo sub la duonlumo), la steloj ornamantaj la unuan poŝtmarkon de Nederlanda Hindujo, ceteraj eldonoj de Kolombio, Venezuelo, Honduro, Kostariko, Salvadoro ktp.

Laste, sed ne balaste, la steloj kiuj revigas altrangulajn oficirojn, sekve la “famega” ruĝa stelo, ne nur simbolo de la Komunista Partio, sed ankaŭ metita sur ordenojn, armeajn ĉapojn kaj uniformojn, eĉ sur la militajaron, ekzemple la ruĝa por la sovetanaj, la blanka por la usonanaj. Ĉu la stelo do estas simbolo de militemuloj? Tute ne, kiel pruvas la multaj pacemaj landoj kiuj aldonis ĝin al siaj nacia aŭ kontinenta flagoj.



Komunista ruĝa stelo



Altrangula oficiro



Ordenoj kun stelo



Ruĝa stelo sur ĉapo

ĈU PLI ŜATATA LA KVINPINTA STELO?

Tre ofte en la filatelo, steloj estas kvinpintaj, sed ne ĉiam. Ne nur tiuj de la eŭropa flago, sed ankaŭ la emblemo de la iama Monda Ekspozicio en Bruselo (1958) kaj multaj aliaj, montrataj en ĉi tiu artikolo. Tamen aperas ankaŭ, sed malpli ofte, steloj kun nur kvar pintoj, kiel en multaj filigranoj de italaj poŝtmarkoj kaj steloj kun eĉ ses pintoj, kiel la tiel nomata “stelo de Davido” de la hebreoj kaj sep ĉe unu el la tipoj de la masonistaj steloj.

Ĉiel, la plej uzata kaj plej disvastigita estas sendube la kvinpinta tipo, alinomata “pentagramo”.





ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:

Elda DOERFLER

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.

Kunredaktantoj: James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com

Albert BOON, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be

ELF-AREK tt-ejo: www.kolektado.esperanto.cc



Eŭropa simbolo



Bruselo 1958



Filigrano



Hebrea stelo



Masonista stelo

Daŭrigota